

Elias Salomon,
Fiducit!

tradukita de Ludwig Emil Meier

“Fiducit” estas vorto el al studenta lingvaĵo el la 18a jarcento, kiu estas mallongigo de la latinaj vortoj “Fiducia sit”. Tiuj vortoj signifas laŭvorte tradukite: “Estu konfido” La esprimo estis uzata de la studentoj dum ilia kunvenoj en la senco de “Konsentite”.

1. Kunuloj tri kunsidis
For de bruanta mond',
Kaj iris la pokalo
Kun ĝojo en la rond'.

2. Ridadis ili trinkante,
Senzorge kun kontent'
De l'mondo tagmizero
Forflugis kun la vent'.

3. Ekmortis unu el ili
Kaj dua la kunul' -
La tria nun solece
Restadis jen trinkul'.

4. Kaj kiam la hor' alvenis
De tiu kolegi',
Li igis pleniĝi pokalojn
Kaj kantis kun energi'.

5. Sidante iam kun liro
Ĉe manĝo en la hal',
Subite falis larmo
En vinon de pokal'.

6. “Al vi, kunuloj, trinkas
Mi nun; sed kial vi
Silente nek moviĝas?
Pro kio restas mi?”

7. Jen glasoj tri eksonis
Kaj malpleniĝis du:
“Al via, gaja kunulo!” –
- Li jam ne trinkis plu! -

...

*Traduko de la Germana poemo "Fiducit!" de ELIAS SALOMON (*1814 - †1885) en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (*1847-02-16 - †1919) en 1907.*

Arg-84-168 (2004-03-26 20:56:02)

Tiu ĉi traduko troviĝas en la kantlibro "Esperantista Kantaro", kiu enhavas tradukojn de germanaj kantoj. La tradukoj estas faritaj de Ludwig Emil Meier. La libro estas eldonita en 1907 de Hans Theodor Hoffmann (Steglitzer Str. 44, Berlin, Germanio).